



Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Bonfara : 10 fkoj } Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62
(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

1965

3 - 4

KULTURAJ KAJEROJ

1965

Majo - Junio - Julio - Aŭgusto

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatoj :

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Gresillon

J. Guyon

Esperanto tra la mondo

A. Frangeul

De preleginto

Pri arto (II)

Drs Roose

Gravaj datrevenoj

La Tours-lando kaj ĝiaj medicinistoj

Prof. Aron (trad. Dro Dumas).

Prezento de prelegoi

De lingvo al informado

al

Modernaj.

La Rochefoucauld.

Fantaziaĵoj

H. Chavan - B. Broadway.

Por via distro.

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzojn.

Ni deziras ke « Kulturaj Kajeroj » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

El Grezillon

(La ĉi-suba raporto estis verkita de junulino, kiu partoprenis la Paskan Kultureman Semajnon en Grezillon. Ankaŭ en Aŭgusto estos sufiĉe granda la nombro de la partoprenantoj gejunuloj. Decidiĝu tuj ĉeesti tiun periodon !)

Internacia kunveno oni tute prave povas nomi la 4an Kultureman Semajnon, kiu okazis en la ĉarma kadro de la Kastelo Greziliono de la 9a de Aprilo ĝis la 16a. Efektive tri kontinentoj estis reprezentataj ĉiujare : Sud-Ameriko dank'al nia venezuala amiko Pedro Aguilar Solà ; Afriko, pli precize Mali kun H. Tambura kaj kompreneble Eŭropo ĉar venis gepartoprenantoj el Germanio, Svisujo, Nederlando, Svedio, Italio, Rumanio kaj Francio. Pri Rumanio ni tuj deziras dankegi Profesoron Pragano. Kiel bonŝancaj ni estis sekvante kursojn kaj aŭskultante paroladojn de tiu eminenta profesoro ĉe la Fakultato de Amsterdamo. Dank'al Profesorino Pragano ni ekleknis multon pri la esperantista literaturo.

Ankaŭ Sinjoro Turin gvidis kursojn tre profitajn por la komencantoj dum aliaj partoprenantoj kuniĝis por paroli pri temoj, kiujn ili mem elektis.

Posttagmeze precipe, ek de la 16a, diversajn kaj interesajn paroladojn faritajn de eminentaj esperantistoj oni proponis al ni. Ekzemple mi citos Sron Duc-Goninaz, agregician profesorino kiu, por nia granda ĝojo, parolis pri la dramaturgio de Puŝkin, la plej fama el la rusaj poetoj. Parolante pri la temo elektita de Sro Thierry, « Aliaj landoj, aliaj moroj », ni nur diros lian konkludon : « la aparteco de la Esperantista Literaturo estas dono samtempa de partikularismo kaj universaleco ». Dank'al Profesorino Martin, ni vidis kiel malfacile estas traduki verkojn — « Hamlet », ekzemple —. Esperanto tamen permesas fari bonegajn kaj eĉ artajn tradukadojn.

Historian kaj socian temon elektis Profesorino Pragano kiam li prezentis al ni sian naskiĝlandon : Rumanio. En tute alia sfero enirigis

ni Profesorino Jelenc, profesorino pri naturaj sciencoj, kiu pritraktis « la klorofilan asimiladon ».

Mirindajn spektaklojn ni ĝuis post la agra-blaj vespermanĝoj. Pere de diapozitivaj ni vojaĝis en la norvegiaj fiordo, kaj tra kvietaj kaj luksa lando, Svedujo. Sinjorino Blanc ni kore dankas. Pri la unua filmo realigita tute esperantlingve de Sinjoro Mahé, « Angoroj », ni diros ke ni ĉiuj estis malspaciencaj vidi ĝin.

La ĉefa afero dum tiu semajno konsistas en tiu fakto ke oni multe donis la parolon al la gejunuloj, aŭ por prelegoj, aŭ por komentoj lumbildojn. Mi pensas pri nia svisa amiko, kiu elektis speleologion kiel temon. Ankaŭ pri nederlanda amikino oni devas paroli. Okaze de la internacia junulara kongreso en Amsterdamo ŝi fotis kaj prezentis al ni tipaĵojn el tiu urbo. Hibrabrahim Tambura, Günter, Vogelmann, Pedro Aguilar tre interesis nin prezentante siajn landojn aŭ urbojn. El Francio, Marie-Claude Turin rimarkinde konigis al ni Stravinsky kaj ties muzikon. Nun, mi ni forgesu tion : Greziliono situas en ĉarma franca regiono : la Loire valo. Do ni ne povis veni ĉi-tien sen viziti kelkajn belajn kastelojn, kion ni faris dank'al Sro Motillon kiu ankaŭ ĉiam sukcesis amuzi nin per siaj ludoj.

Kompreneble oni permesis paŭzojn al ni, dum kiuj ni aŭdis nian faman kantiston Bernard Liouville ; ni piede promenis en la parko, ludis tablotenison, k.t.p.

Niaj plej taŭgaj dankegoj al ĉiuj organizantoj kaj gvidantoj (Sinjoro Llech-Walter — nia estimata prezidanto de U.F.E. — kaj gesinorino Babin, Turin, Jelenc, Blanc, sen forgesi la tute sindoneman kastelestron Sinjorino Micard, al kiu ni estas multe dankemaj) estos niaj klopodoj por daŭrigi « la pacan batalon ». Finfine mi diros ke la ĉiujaraj provoj konsistigas ĝermojn de la venontaj kulturaj semajnoj, kiuj akcelas la disvolvigon de Esperanto.

Jaqueline GUYON

(unu el la gejunuloj).



**ĈIUJ ĜUAS LA LEGADON DE KULTURAJ KAJEROJ
ANKAŬ VI
NE FORGESU ABONI KAJ ABONIGI VIAJN AMIKOJN.**

Adreso :

**MICARD Henri
Kulturaj Kajeroj**

**Epineux-le-Séguin (Mayenne) - C.C.P. Nantes 2349.62
(vidu la liston de la perantoj sur la lasta paĝo)**

Esperanto tra la Mondo



La Universala Kongreso

La Universala Kongreso okazos sub la protektado de Dro Yuji Shibata, prezidanto de la Japania Akademio. Ĝis nun aliĝis pli ol 1.500 gesamideanoj.

Esperantista Renkontiĝo

Tiu feria semajno okazos de la 24-a ĝis la 31-a de Julio, kun belaj ekskursoj en pitoreska regiono. Adreso : Bona Stelo, 31, rue Pêcherie, Romans, Drôme, Fancujo.

El Grésillon

Okaze de la Paska restado kultura en la Kulturdomo, la regiona televido prezoŝtis kelkajn bildojn pri la kulturaj aranĝoj. La regiona radio pli longe raportis.

Restas ankoraŭ kelkaj sed nemultaj liberaj lokoj en la kastelo por la someraj tre interesaj restadoj. Tuj petu la programon.

El Svedujo

La 10-an de marto, ambaŭ ĉambroj de la Sveda Parlamento unuanime komisiis la Svedan Registaron iniciati ĉe Unuiĝintaj Nacioj aŭ ĉe Unesko la starigon de internacia komitato por esplori la mondan lingvan problemon kaj rekomendi difinitan solvon.

Laŭ ĝia propono la supera internacia instanco devus elekti internacian komitaton el ekonomistoj, statistikistoj, sociologoj kaj aliaj fakuloj. Ties ĉefa tasko estus kolekti kaj publikigi kiel eble plej precizajn informojn pri la lingva problemoj kaj pri la kostoj de la eblaj solvoj.

El Usono

Katalogo de esperanto-lernolibroj kaj literaturo estis sendita de ELNA al 2.000 altlernejaj kaj universitataj bibliotekoj.

El Novzelando

La konata esperantisto Ralph L. Harry estis nomita ambasadoro de Aŭstralio en Bruselo. Li ankau estis reprezentanto de sia lando en la Eŭropaj institucioj de la Komuna Merkato.

El Kubo

Landa Asocio estas fondita en Kubo. Adreso : Kuba Esperanto-Komitato, Apartado 570, Camaguey, Kubo.

El Koreo

Multaj koreanoj deziras korespondi. Adreso : S-ro Taekeng Kim ; Internacia P.O. Box 1232, Seulo, Suda Koreo.

El Primošten

La esperantista kampadejo estos malfermita dum la tuta somero. Ĉiujn informojn donas : Internacia Esperanto-Kampadejo Primošten ĉe **Šibenik**, Jugoslavio.

Novaj libroj (haveblaj ĉe nia Libro-Servo)

« Kaŭkazaj rakontoj » de la granda rusa verkisto Lermontov.

« Hamleto » de Shakespeare, en la traduko de Newell.

« Soifo », poemkolekto de Tarkony.

« Sur la vivovojo » poemkolekto de Aleksandro Logvin.

« El tero kaj etero » originala novelaro de B. Ragnarsson.

« Kalevala » la granda nacia vera eposo de la finnoj.

« Internacia elektronika vortaro » eldonita de la Pola Asocio.

— Jus estis sendita al la membroj de U.E.A. la jarlibro 1965. Ĝi havas 630 paĝojn kaj, krom tre interesaj informoj kaj adresoj pri la esperantista movado, entenas la adresojn de 3.433 delegitoj.

Revuo

La revuo « Kemio Internacia » komencis aperi. Abono por 1965 1 dolaro ĉe Sro A. Barrocas, Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo.

— Ni atentigas vin pri la porinfana gazeto « Nia Voĉeto » 4, Queens st., Chesterfield, Britujo. Specimeno : 1 stelo ; jarabono : (4 ekz.) 7 steloj.

Teatro

La dramo de la usona verkisto Wincelberg : « Katakis signifas malamiko », tradukita en esperanton, estis ludita kun granda sukceso en Pollando kaj Ĉeĥoslovakio, prezentita de ŝtata Teatro populara de Lodz.

— La pupoteatraj amatoroj rilatu kun : « Esperantista Pupoteatro », p/a S-ino Navenka Imbert, Ljubljana 32, Zagreb V, Jugoslavio.

Propagando per Esperanto

La granda aŭtomobilfabriko Fiat, ĵus eldonis kolorfilmon kun paroloj en Esperanto pri la veturilo « 850 ». Adreso : Fiat, Direzione Stampa e Propaganda, Corso Marconi 10, Torino, Italio. Oni scias ke Fiat jam eldonis luksajn faldfoliojn en Esperanto.

— La Trafikoficejo en Berlino eldonis tre belan koloran faldfolion, Mendu ekzemplerojn (almenaŭ 10) ĉe : Verkehrsamt Berlin, Fasanenstr. 7-8, 1 Berlin 12, Germanujo, per simpla poŝtkarto. Ili estas senkostaj.

Kaj fine...

... restas nur kelkaj monatoj por subskribigi al individuoj aŭ kolektivoj la peticion favoran al Esperanto, kiu estos sendita al Unuiĝintaj Nacioj !

De preleginto en Grésillon

PRI ARTO (II)

La Objekto

Ĉio jam skribita temas pri la sintenado de la subjekto al la objekto, de la homo al la artaĵo. Nun kelkaj vortoj pri la objekto mem : la artaĵo.

A) Tekniko. Kiam oni diras ke Jan Van Eyck mirige pentris la transiron de lumo al ombro ; aŭ kiam oni diras ke Hans Memlinc kapablis pentri harmaldike, ĉu oni faras aludon al la arto de ambaŭ ? Tute ne. Oni faras aludon al ilia tekniko. Oni diras tiam fakte ke ili majstre teknikas, ke ili havis en mano ĉiujn rimedojn. Ĉu tio estas arto ? Ne, tio estas lerteco. Multaj pretendas la kontraŭon. En la historio de la arto oni laŭdas multajn kreaĵojn kiel grandajn artaĵojn ĉar ili estas venkoj je teknikaj malfacilaĵoj. Sed se tekniko estus arto, tiam la tereno de la arto estus multe pli vasta ol oni ĝis nun supozis. La sporto envenus la teronon de la arto. Ja, estas sportistoj kiuj estas mirinde lertaj ; kaj kelkaj ludoj estas farataj per majstra tekniko. Sed tiuj personoj estas virtuozoj ; eble ankaŭ artistoj, sed ne certe. Virtuozo en la pianoludo povas ludi ege rapide, sen unu manko aŭ eraro. Sed la artisto havas iom pli fortan frapon, foje iom pli malfortan : la paŭzo estas foje iom longa, foje tuj for. Kaj per tio li metas sian animon en la muzikaĵon. Ni do sugestas, ke oni povas laŭdi teknike grandajn kreaĵojn kiel artaĵojn nur se tiuj teknikaj venkoj ebligis pli bone vidigi la artan karakteron, se do ili plialtigis la « Artajon ».

B) Manierismo. Se oni diras, ke Hans Memlinc havas preskaŭ ĉiam pejzaĝon en la fono de siaj pentraĵoj, oni denove ne faras aludon al lia arto, sed nur al iu maniero de li, al kutimo, procedo. Same, kiam oni atentigas pri la mezuro, pri la grandeco de personoj aŭ bestoj. Tiel oni havas la « S » formon ĉe Rubens ; ĝi estas bonega ilo por pli intense montri la patoson. Aliflanke se oni tro ofte kaj precipe ne nature uzas tiajn procedojn, oni venas al manierismo. Tio malhelpas la serenecon ; la vivrealecon kaj aliajn ecojn de la vere granda artverko.

C) Ĉu arto estas objektiva aŭ subjektiva ?

Ĉu la artaĵo estas bela en si mem, sendepende de la beltrovo de la homoj (= objektiva) aŭ ĉu ĝia beleco nur ekzistas laŭ la gustoj de la homoj (= subjektiva) ? La beleco de floro estas subjektiva, lu opinias la rozon belega, alia bela, alia beleta. Ĉiu el tiuj tri pravas. Li fakte nur asertas ke ĝi, laŭ lia gusto estas belega aŭ bela ktp. Se tia estus ankaŭ la artaĵo, tiam la artverko estus dum iu tempodaŭro bela, kaj poste eble malbela. Ĉar ja la gusto de la homo ŝanĝiĝas ! Sed artaĵo estas bela, nepre, se vere ĝi estas arta ; kaj ankaŭ kiam homoj opinias ĝin malbela. Jen la pruvo. Se ni troviĝas antaŭ ia belaĵo kiel ekz. bela taso aŭ vazo, ni sentas en ni agrablan senton. Sed ĝi ne trafas nin forte kaj profunde. La sento estas supraĵa, korpa, materia. Sed se ni troviĝas antaŭ artverko, ekz. Gotika katedralo, ni nur sentas agrablan, supraĵan senton, sed ni sentas nin trafitaj en nia tuta persono ; ĝi estas nian tutan personon. Nenio en ni restas netuŝita : la artaĵo parolas al ni. Ĝi havas signifon kaj objektivan valoron. Kaj se eble iu najbaro opinias ĝin ne bela, deklaras sin netuŝita, ni povas klarigi al li la belecon, la artecon de tiu artaĵo. Ni povas klarigi tion, kio estas en tiu verko. Kaj fine li komprenos. Ĉar tio estas la proprajo de la arto ke ankaŭ malplaĉaĵoj povas havi ian belegecon, esprimplenecon, mesaĝon.

Edukado pri arto.

Iu artverko povas esti bela ankaŭ se neniu konsentas pri ĝia beleco. Tio povas ŝajni stranga. Sed tio jam okazis. Nun oni ĝenerale konsentas ke tiuj belegaj Francaj Gotikaj katedraloj estas ĉefverkoj en la tuta historio. Sed dum la Renesanco oni radikale kontraŭdiris tion. Estas tial ke oni nomis tiun arton Gotika, kvazaŭ inda nur de la plej barbaraj inter la barbaroj. Io simila ne plu tiel ĝenerale okazas nun. Tamen multaj homoj konfesas ne vidi nek senti la arteblecon de iu artverko. Tiujn oni devas eduki pri arto. Kaj, se arto estas io bela en si mem tiam la beleco devas esti klarigebla, montrebla, komprenebla. Antaŭ tia kreaĵo oni devas pensi, klarigi la kialojn de ĝia beleco.

Kio estas arto ?


Por ke iu verko estu artbela, ĝi devas elradii ion de la mistero de la vivo kaj de la homo. Tre malfacile oni trovas difinon pri arto. Oni ja trovas multajn kiuj nenion diras. Sed ni serĉas difinon kiu montras la esencon de la arto. Ni konstatas ankaŭ ke oni ne ĉiam same opiniis pri la tereno de la arto. Longtempe fotografado estis konsiderata kiel la malo de arto. Nun oni parolas jam pri foto-arto. Prave, laŭ mi. Efektive, la naturo estas ne nur bela sed foje ĝi speciale kaptas nian atenton. Povas okazi ke subiranta suno prilumas tute trankvilan, ventotrankvilan arbaleon per ensorĉiga lumo. Jen la mistero kaj la grandeco de la natura vivo staras antaŭ ni. Nu, kiam oni sukcesis kapti en lumbildo tiun vivantan, al ni parolantan naturaspekton, oni donas ion pli ol

nuran foton ; kaj tio estas arto. Io de la mistero de la vivo, sed tiam en ĝia plej vasta senco. Tial ankaŭ ekzemple la riĉega fantazio, ĉu per bildoj, ĉu per koloroj, ĉu per sonoj, ĉu oni kreas paradizon, ĉu oni montras internan kaŝitan vivon.


Fina vorto

Ne ĉia estas nun dirita pri arto. Nur kuŝas tie-ĉi kelkaj pensoj kiuj povas gvidi vin. Ne imagu ke depost nun vi tuj ĉion komprenos. Vi devas ankaŭ lerni kaj lerni rigardi. Ni devas ankaŭ komenci per iometa studo de la ĉefverkoj. Sciŭ ankaŭ ke en tiu fako, multo dependas de la persona kapablo senti. Rilate al artaĵo oni ĉiam multe pli intuicie sentas ol oni konscie kaj klare scias ; kaj oni ĉiam multe pli scias ol oni kapablas esprimi.

Drs. F. ROOSE.



GRAVAJ



DATREVENOJ

Antaŭ 90 jaroj naskiĝis en Lubeck :

Thomas MANN (1875-1955). — Tiu verkisto priskribis en siaj libroj la brilon kaj la dekadencan de la kulturo de la altburgo dum la lasta jarcento. Per majstra lingvo, en multaj noveloj, Thomas Mann rakontis la vivon de tiuj homoj disrompitaj inter sia korpo kaj sia spirito. Jam dum sia vivo, Thomas Mann havis mondan influon ! Li ricevis la Nobel premion en 1929 pro sia verko « La Buddenbrooks ».



Antaŭ 60 jaroj naskiĝis en Parizo :

Jean-Paul SARTRE. — Poeto, filozofo, pentristo kaj film-aŭtoro, la « patro de ekzistencialismo » estas konsiderata unu el la ĉefaj revoluciuloj (en la pozitiva senco de la vorto) de sia generacio. Por disvastigi siajn ideojn li brile utiligas multajn esprim-rimedojn. « Esto kaj Neesto » estas a ĉefa filozofia verko de J.-P. Sartre. La Nobel-premio estis atribuita al li en 1964 sed li refuzis ĝin.

(Fino Colette Llech-Walter skribis bonan studon pri « La ekzistencialistaj herooj », libreto dulingva, franca-esperanta ; aperis ankaŭ en Esperanto tradukoj de kelkaj teatraĵoj kaj novelo de Sartre ; « Seneliro » kaj « La respektema putino » estis prezentita okaze de Universalaĵ Kongresoj).



Antaŭ 25 jaroj mortis en Muralto :

Paul KLEE (1879-1940). — Tiu pentristo estis speco de sorĉisto. Kontraŭ la reala mondo, li pentris mondon de fantazio kaj ironio. En siaj desegnaĵoj kaj pentraĵoj Paul Klee disvolvis la « lingvon de bildo » kiu tiom influis la modernan pentro-arton. Liaj figuroj kaj formoj kvankam abstraktaj reatingas objektecon. Li estis unu el la fondintoj de « Blaue Reiter ». Li instruis en Weimar kaj Dessau kaj, de 1933, vivis en Svisujo.

(Desegnaĵoj de Paul Klee aperis en la poemaro : « Pinta Kraĵono » de Reto Rossetti).

LA TOURS-LANDO KAJ ĜIAJ MEDICINISTOJ

De Pro ARON

Dojeno de la Medicina Fakultato en Tours

(2-a parto)


Ni ne forgesu tion, kion la Tours-a Lernejo ŝuldas al St-Martin. Cetere, laŭ legendo, estas al konsultado ke la urbo ŝuldas la enloĝigon de St-Martin. Post la morto de la episkopo St-Lidoire, en Septembro 374, la enloĝantoj decidis venigi al si la monaĥon Martin, kiu havigis al si faman reputacion de sankteco en la monaĥejo de Ligugé, du leŭgojn for de Poitiers. Iu Tours-ano, Rucirius, kredigis al la monaĥo, ke lia edzino estis danĝere malsana, kaj petegis ke li ne rifuzu al ŝi la helpon de siaj preĝoj. Martin ne ekkonsciis pri la ruzo, eliris el sia ĉelo, kaj kondukita al Tours, li estis enoficigita de la amaso, kaj nomita kiel episkopo. Lia influo, ne malrapide, graviĝis, kaj norde de la urbo, inter la Loire kaj la klifo, li starigis la Abatejon de Marmoutiers. Post lia morto, la Baziliko, starigita super lia tombejo rolis kiel plej fama pilgrimejo en Francio, kunigante kultantojn kaj malsanulojn, kiuj petigis miraklon. Kaj dum la IX-a jarcento, la Lernejo en marmoutiers estis tre fama centro por primedicina instruo. Pli speciale ĝi estis famigita de Raoul Leclerc, kiu havigis al si multajn skolanojn, samtempe lertajn kuracistojn, kaj sanktajn resanigistojn. La ŝuldosento de la malsanuloj estis profitodona al la komunumo, kaj al tio oni ŝuldas la starigon de multaj priorejoj kaj preĝejoj, tra nia regiono.

Sub la regno de Charles VII-a, kaj Louis XI-a, la historio de la regiono estas de Francio mem. La reĝoj kunvokas ĉe si, regionajn eminentulojn. Adam Fumée, naskita en Tours, estis la ĉefa kuracisto de ambaŭ reĝoj. Louis XI-a, malkvieta pri sia saneco, nomis lin, por sin liberigi de li, kiel majstro por la petoj, kaj poste ministro pri Justico. En 1482, li venigis al la kastelo de Plessis, la monaĥon St-François de Paule, el Kalabro, esperante

ke li sukcesas plilongigi lian vivon. La reĝo mortis la sekvantan jaron, sed la monaĥo estis poste sanktigita. Profesoro Mercier rakontas al ni ke, ĉe la proceso por sanktigo, kvindek-tri vidaj atestantoj venis por certigi la realecon de la miraklaj resanigoj, ŝuldataj al St-François.

Nicolas de Nancel praktikis la kuracarton en Soissons, kaj poste en Tours. En lia unua verko « Medicinisto ĉe la Tours-anoj », eldonita en 1569, la regiono estas simbolita per figuro de « maljuna nimfo, kovrita de multe da mamoj, tiom antaŭe kiom malantaŭe, kiel simbolo de abundeco kaj fekundeco ».

Originala estis, ankaŭ, Cl. Quillet, kiu praktikis medicinon en Chinon, kaj poste en Loudun. Richelieu petis de li ke li instru la aferon pri la pastro U. Grandier, akuzita pro sorĉaĵoj kontraŭ monaĥinoj. Estis la unua « Besnard-afero » en Loudun. Grandier estis brulmortigita, kaj Quillet, akuzita pro malprudentaj diroj, estis devigata al fuĝo Italion. Latinverse, li verkas « la Belpedieco, aŭ la arto havigi al si belajn infanojn ».



Unu el niaj bulvaroj portas la nomon de Heurteloup, infano de la urbo, kiu fariĝis Direktoro de la Hirurgia Sekcio de la Granda Armeo, kiun li organizis majstre, kaj restas kiel unu el la plej elstaraj reprezentantoj de la Franca Militista Medicino.

La medicina societo el « Indre et Loire », kiu ricevis ĉefan rolon, post la revolucia tumulto, en la disvolviĝo de la kuracarto en nia regiono, estis starigita en 1801, sub la impulso de Origet. Doktoro Origet estis fama en Tours, komence de la XIXa jarcento... Balzac senmortigis lin, ĉar li eniris, kun nomo ne ŝanĝita, en « La lilio en la valo » en kiu libro li provas kuraco Sino de Mortsaufr. Aliajn Tours-anojn oni renkontas en la verkaro de Balzac, kiel Ch. Nerbonneau, kiu ŝanĝiĝas al « Carboneau ». Balzac, jam infano, aŭdis pri medicinaj problemoj. Oni, ja, scias, ke la patro de Honoré, vic-urbestro en Tours, kaj administranto de la hospitalo, interesiĝis pri higienaj problemoj. Ĉe la fama Tours-eldonejo Mame, li eldonis plurajn memuarojn. Li okupis sin, speciale, pri la skandala sorto de la needziniĝintaj patrinoj, proponis ke la murdintoj rehonorigu dank'al la laboro, tial, do, li estis la profeto de « ergoterapio », li verkis memuaron pri Rabio, kaj, tiuokaze, por limigi la intimecon inter homoj kaj hundoj, li proponis « imposton pri la hunda amaso ».

... Sed dank'al P.F. Bretonneau, la Tourslando rajtas fieri, ĉar ĝi ludis decidigan rolon en la historio de medicino. Porsaniga oficiro en Chenonceaux, posteulo de sep generacioj de apotekistoj kaj ĥirurgiistoj, Bretonneau, en 1855, estis enoficigita, 37 jara, kiel ĉef-kuracisto de la Tours-Malsanulejo. Estis tie, ke, dum 22 jaroj, li persistege laboris por « diferenci la fakton dis de la opinio », terenpuŝis la malnovajn misfarajn dogmojn, kaj ekirigis medicinon sur vojon al la progreso.

Bretonneau meritas, pro sia profeta teorio de la specifikado, esti konsiderata kiel la patro de la nuntempa medicino... Li asertis, longtempe antaŭ la Pasteur-aj eltrovoj, ke « speciala ĝermo, specifika de ĉiu kontago, naskas ĉiun kontagan malsanon ». Li estis, plie, eŭrope, fama konsultanto, kaj multaj famuloj veturis al St-Cyr-sur-Loire

por havigi al si liajn konsilojn... Bretonneau estis diskreta scienculo, kaj sen helpo de liaj skolanoj, liaj eltrovoj ne estus rivelitaj. Ili kunportis al Parizo la Tours-anan lumon : Troussseau, la plej fidela kaj la plej ŝatata disĉiplo, kies profesia suprenirado estis miriga, kaj, unuafoje, en la Dia-Hospitalo, funkciis kiel pariza hospitala sekci-ĉefo, solena ĉefo de imponega medicina skolo ; kaj Velpeau, obstinega kaj entuziasma, kiu suprenprengis la francan ĥirurgion al plej altaj suproj. Kiom multe aliaj estis ŝuldantaj al tiom prestiĝo-plena majstro de brilega kariero.

... Ni elvoku tie-ĉi, Raphael Blanchard, naskita en St-Christophe koketa vilaĝo de nia departemento, kie naskiĝis, ankaŭ, Ed. Labbé, kiu karierigis kiel sekci-ĉefo en Parizaj Hospitaloj, kaj Fulgence Raymond, pioniro de Neŭrologio, kiu famigis la katedron en la Salpetrière. Blanchard, preparisto de P. Bert, pasia pri Naturaj Sciencoj, kreis la Parazitologion, kaj la Instituton pri Tropik-Medicino. Historiisto kaj artisto, li grupigis en du libretoj « Tradicioj kaj superstiĉoj en Tours-lando », kaj li estis instigita, de tiu pasia interesiĝo al la kutimoj de la populara medicino, al starigo, en 1902, de la Franca Societo pri Historio de la Medicino, kies unua Prezidanto li estis.

La nuntempaj medicinistoj, Tours-anoj laŭnaske, aŭ laŭkore estas sekvintaj la paŝoj de siaj antaŭuloj.

*Mallongigita kaj esperantigita
de Dro J. Dumas*



DUOBLA JUBILEO :

La eldonejo STAFETO presis sian 50-an volumon. Preskaŭ samtempe la eldonisto S-ro Juan Régulo-Pérez fariĝis 50-jara. Gratulojn !

Prezentado de serio de prelegoj

DE LINGVO AL INFORMADO

I. — DIFINO.

Lingvo, socia fenomeno, estas ĉio, kio esprimas sentojn, pensojn, esplordan de spiritaĵaj kampoj.

II. — NASKIĜO DE LA PAROLA LINGVO.

Laŭ studoj de la prahomaj kranioj, la iamaj homoj kapablis nur eligi sonojn, kriojn, ĝemojn, kiuj, unue nekonsciaj, fariĝis iom post iom konsciaj kaj simbolaj, ne apartigante agojn kaj objektojn. La sonaj simboloj diversaj laŭ la homgrupoj pliiĝas, aliformiĝas.

III. — KIO OKAZAS, KIAM NI PAROLAS ?

Per sonaj simboloj, ni kapablas projekcii nian spiritan mondon en alian internan menson, por konigi niajn sentojn, sciigi ion aŭ agigi aliajn homojn. La parola lingvo estas necesa inter homoj kaj fariĝos socia ligilo.

IV. — ĈU PAROLA LINGVO SUFIĈAS ?

Preskaŭ ĉiam homoj instinkte aldonas miensignojn, gestojn, sintenadojn. Kiam temas pri longdistancaj rilatoj estas uzataj aŭdaj aŭ vidaj signaloj.

V. — EVOLUO DE LA LINGVO.

Same kiel la infano lernas paroli, lingvo kreiĝas iom post iom laŭ diversaj faktoroj. La homgrupoj ne kreis ĝin tute arbitre, plene laŭplaĉe; la medio, la historia evoluo influis ĝian enhavon kaj formon. Ĉar lingvo estas vivanta, ĝi ne estas senŝanĝa. Lingvo celas al unueco. Pro internaciaj rilatoj, estas nun necese koni fremdajn lingvojn sed poliglotoismo ne povas esti solvo kaj oni klopodis krei internaciajn lingvojn. Ne necese estas substreki, ke, tiucele, Esperanto estas daŭra sukceso.

VI. — EFIKO DE PAROLO.

De la malgranda infano, kiu ĝuas ripetitajn sonojn aŭ frazojn de infanecaj rakontoj ĝis plenkreskuloj, kiuj « ĝojas fronti sian cerbon kontraŭ tiu de alia homo », ĉiuj plezure uzas parolon. Vorto estas potenco : ĉe la Nova Testamento, oni legas : « La Vorto estas Dio » ; ankoraŭ nuntempe kelkaj triboj timas la tabu-vortojn : eble nekonscia memoro de origina rita uzado de la vorto.

VII. — POR BONE RAKONTI.

Sukcesplena rakonto tuŝas korojn, cerbojn, sentemon kaj intelektojn per ĝia temo ; la rakontanto konvinke transdonas sian emociion al la aŭdanto por ĝin kuntroni, sugestii, partoprenigi.

VIII. — PREZENTADO DE RAKONTOJ.

Oni povas transdoni rakontojn ne nur parole sed per :

- Teatraĵoj diversformaj
- Marionetoj
- ombroj
- kino kaj televido
- diskoj kaj sonbendoj
- libroj, gazetoj, revuoj...

IX. — POR TENI LA RAKONTOJN.

Tre diversformaj estis la signojn uzitaj de la homoj por fiksi la parolon antaŭ la eltrovo de la skribo. La alfabetoj estas malsamaj laŭ la landoj kaj epokoj.

Apartaj estas la muzik-skribo, la skribo de Braille por la blinduloj, tiu de Morse por telegrafo, stenografioj kaj stenotipioj.

El papiruso, pergamento, poste el papero, la libroj estis unue longaj volvitaj folioj, poste serioj de kajejoj. Nun mikrofilmoj ebligas ricevi ampleksan verkaron en malgrandan lokon.

X. — DISKONIGO DE LA VERKOJ.

Ricevi alilandsajn librojn estas nun sufiĉe facile, tamen estas malhelpiloj kiel la cenzuro, religia aŭ politika, la doganaj baroj kaj la lingvaj malfacilaĵoj, kiujn oni solvas per traduko.

XI. — TRADUKADO.

Traduki estas rekrei, trovi ekvivalenton de penso, kiu kuŝas malantaŭ la diversaj vortaj esprimoj. Tradukisto devas uzi siajn tutajn komprenemon, lertecon, sciencan, moderecon por ne perdi la verkiston. Bildoj en libroj estas alispeca traduko, kiu postulas tiom da kvalitoj, kiom la vorta traduko.

XII. — RAKONTOJ POR INFANOJ KAJ GEJUNULOJ.

Ilia modo ne estas la nia ; ili deziras rektan, sanan, sinceran, fortigantan, altigantan literaturon ; ili bezonas trovi mirvekon en la realaĵoj.

XIII. — KIAJ RAKONTOJ ESTAS BONAJ ?

Tiuj, kiuj kontentigas koron, spiriton, imagon, tiuj kiuj helpas plendisvolvon, vivamon, montrante, ke ĉiu homo estas socie utila, ke la homaro havas komunan pacan idealon ? Tiamaniere, ili forigas ĉiuspecajn antaŭjuĝojn

XIV. — INFORMILOJ.

Informilbroj kaj gazetaro estas la plej gravaj kaj efikaj ĉar ili estas daŭraj kaj ĉiam konsulteblaj.

— Radio, kino, televido alportas voĉojn kaj bildojn tutmondajn.

— Diskoj, sonbendoj povas esti dokumentoj pri homa vivo.

— Afiŝoj alkrasas la atenton same kiel la reklamo en la ĉiusupraj informiloj.

— Elektronaj maŝinoj donas rezultojn pri malfacilaj kalkuloj aŭ tradukoj.

XV. — EFIKO DE LA NUNTEMPA INFORMADO.

Atingante ĉiujn homojn, ĝi kreskigas la senton, ke ili fariĝas pli kaj pli proksimaj kaj formas grandan kolektivumon. Tamen estas ankoraŭ problemoj pro la multnombraj analfabetoj.

Unuavide, laŭdinda estas la klopodo disvastigi la pli kaj pli ampleksajn kaj specialigitajn konojn al ĉiuj homoj sed povas esti danĝere, kiam simpligitaj aŭ ne kompletaj sciigoj povas erarigi forigante gravajn punktojn.

XVI. — KONKLUDE.

Lingvo estas altvalora homa interkomunikilo. Ĉar vida civilizacio emas anstataŭ la parolan, la homoj devas lerni legadon kaj logikan analizon de la bildojn sama kiel ili legas kaj analizas skribajn verkojn.

S-ino G. ROUX.

MODERNAĴOJ



Tiu « minikoptero » estis konstruita en Sud Afriko laŭ inventaĵo de Llew Strijom. La unua ekzemplero estis vendita en Decembro 1963 kaj tiom granda estis la sukceso, ke antaŭvendiĝis ĉiuj « minikopteroj » konstruotaj dum la ses venontaj monatoj. La fabrikantoj baldaŭ konstruos uzinon en Aŭstralio.

Tiu vera « ĉielpulo » estas nur unuloka. Ĝia plej granda rapideco estas 176 km. pohore kaj ĝi povas atingi 4.800 m. altecon. La normala vojaĝ-rapideco estas 112 km. pohore. La proksimuma pohora benzin-konsumado estas 48 litrojn. Ĝi povas iri 320 kilometrojn sen nova pleniĝo de la benzinujo.

Au-dessus de la mêlée

Televidiloj estis instalitaj en Parizo, placo de la Concorde por kontroli la aŭto-trafikon. Tiamaniere la trafik-respondeculoj povas orientigi la aŭto-fluadon de ma'proksime. Elektroniko ĉiutage mirigas nin !



Niaj virtoj estas plejofte nur maskitaj malvirtoj (L. R.)

La Rochefoucauld

La 15 an de Septembro 1613 naskiĝis en Parizo, Francisko, princo Marcellac, heredonto de la titolo Duko de la Rochefoucauld.

Kutime tiuepoke en la nobelaj familioj la plej aĝa filo estis farigonta oficiro kaj pro tio, Francisko ricevis edukadon pli militistan ol intelektan. Nur 15 jara, li edziĝis al Andrée de Vivonne. Ni scias ke li havis ok infanojn sed ĉu tiu edziĝo ĝustigis lian penson : « Kelkaj estas bonaj, neniu estas bonega », tio restas mistero.

Post sia edziĝo, La Rochefoucauld eniris la publikan vivon per partopreno en la kverelo inter la tiama reĝino Anna de Aŭstrio kaj la ĉefministro Richelieu. Li helpis la reĝinon. Sed Richelieu gajnis kaj La Rochefoucauld estis ekzilita dum du jaroj. Post la morto de Ludoviko la XIIIa, li spertis la sendankecon de la reĝino, tiama regentino. Afliktiginta, La Rochefoucauld batalis kontraŭ la reĝino kaj la ministro Mazarin kun la Frondanoj. Sed denove li malgajnis : li estis serioze vundita kaj spertis perfidojn kaj elreviĝon. Li poste diros : « La spiriton ĉiam trompas la koro ». Senluziigita la submetiĝas al Mazarin kaj retiriĝas en sia bieno.

De tiam La Rochefoucauld skribas la « Memoroj pri la regenteco de Anna de Aŭstrio ». Kiam li revenas en Parizo, tie furoras la « Literaturaj salonoj ». En iu el tiuj salonoj naskiĝas nova speco de literaturaĵo : la « maksimo », kiu konsistas en mallonga spirita esprimado de profunda penso. La Rochefoucauld rapide montras sian majstrecon ; dank'al penetra inteligenteco, per vivoplena konciza stilo, li esprimas sian disreviĝon. Eĉ lia granda korinklino al Sino de la Fayette ne sukcesas mildigi la amarecon de liaj paroloj.

Kuraĝigita de la favorega akceptado renkontita de liaj maksimoj, La Rochefoucauld publikigas en 1665 libron titolitan : « Pripensoj aŭ sentencoj kaj primoraj maksimoj ». Tiu libro ricevas tian sukceson ke ĝi estas kvarfoje reeldonita. Okaze de ĉiu reldono la verkinto faras kelkajn korektojn kiuj montras, ke li deziras verki veran literaturaĵon, kvankam li malakceptis « fotelon » en la Akademio. Tiu viro,

kiu tute ne emis al oficialaj distingajoj, sukcesis forgesigi siajn politikajn malsukcesojn per tiu libro pri kiu Voltaire diris, en la sekvanta jarcento, ke ĝi estas « La unua valora libro de la franca prozaro ».

★★

« Pripensoj aŭ sentencoj kaj primoraj maksimoj » estis esperantigita de Profesoro Waringhien, nuna Prezidanto de la Akademio de Esperanto, en 1935 kaj aperis en la Pariza eldonejo Félix Alcan.

Ĉi sube ni citas kelkajn el la plej trafaj maskimoj en la traduko de Prof. Waringhien :

« La modero de la feliĉuloj venas de la trankvilo, kiun ilia bona sorto havigas al ilia humoro. »

« Ni ĉiuj havas sufiĉe da forto por elporti fremdajn malfeliĉojn. »

« Filozofio facile triumfas super estintaj kaj estontaj malfeliĉoj, sed la estantaj triumfas super ĝi. »

« Oni bezonas pli grandajn virtojn por elteni la bonan sorton ol la malbonan. »

« La malbono, kiun ni faras, ne altiras al ni tiom da persekuto kaj da malamo, kiel niaj bonaj kvalitoj. »

« Se ni havus neniam orgojlon, ni ne plendus pri tiu de aliaj. »

« Ni promesas laŭ niaj esperoj, kaj ni plenumas laŭ niaj timoj. »

« La vero ne faras tiom da bono en la mondo, kiom da malbono faras ties ŝajnoj. »

« La amo al justeco estas, ĉe la plimulto el la homoj, nur timo, ke ili suferos maljustecon. »

« La kaŭzo, kial la geamantoj ne enuigas kunestadante, estas, ĉar ili ĉiam parolas pri si men. »

FANTAZIAĴOJ

ESTU BONAJ POR LA BESTOJ

Tiel formuligas la afiŝeto, kiun, unu matenon, mi rimarkis unuavide ĉe stratangulo, kies nomon mi ne plu memoras.

Tute senkompata mi ne estas, tamen dum mia tuta vivo mi povis nur plendi pri la bestoj; rilate ilin, aŭskultu miajn traviĝojn:

Estante bubeto, jam en mia ventro, vermoj amuziĝis elektante la plej bonajn el miaj nutraĵoj. Mi ankoraŭ ne sciis marŝi, kiam batalema ansero tute senvestigis min. En lernejo, ĉiuj parazitaj de la klaso rendevuis sur mia blonda kapo.

Stormvespere, granda, vila bruna araneo preskaŭ min balbutigis por eterne; baldaŭ poste, iu kolerigita bovido surkampe piedpremis mian korpon.

Abeloj, mian vizaĝon supermezure ŝveligis ĝis diskrevo; kaj dum gaja pikniko, flava vipuro, el la plej venena speco, kruele mordis mian nudan piedon. Alian tagon, pa-

pago, laŭdire malsovaĝa, pinĉis mian nazon kriante: « Merita puno, aĉa bubo ».

Antaŭ nelonge nigra kato min ungovundis ĝis osto. La morgaŭan tagon dikega hundo gustumis unu el miaj suroĵoj.

Tio ankoraŭ ne estas la fino: ĉevalpiedbato dolore kontuzis min, kaj samtage bovoviro minacis min per siaj pintaj kornoj. Lastsemajne glutante fiŝosteton, mi preskaŭ sufokiĝis. Antaŭ hieraŭ mi havis terure malbonan digestadon pri kuniklo; ĉi matene rigardante aviadilojn, mi iĝis viktimo de malrespektema pasero, kiu subite kaj ekzakte fermis mian dekstran okulon per malbonodora buleto.

Ho! ve! vidu, por plenigi la malfeliĉon, dum mi skribis tiun prozon, muŝo falis en mian glason. Post tio ja:

ESTU BONAJ POR LA BESTOJ.

Hélène Chavan.

KIAL ĜENI SIN

Ĉu vi jam pripensis, ke la vivo de viro estas plenplena de ĝenoj kaj tentadoj? Li venas en la mondon sen konsento kaj eliras kontraŭvole. Kiam li estas malgranda, la plenkreskaj knabinoj kisas lin, kiam li estas plenkreska la knabinoj lin kisas. Se li estas malriĉa, li ne sufiĉe zorgas pri sia mono. Se li ne estas politikisto, li faras nenion por sia patrujo.

Se li ne donas ion ajn por bonfarado, li estas mizerulo. Se li fordonas multon, li deziras paradi. Se li estas aktive religia, li estas hipokritulo. Se li ne interesiĝas pri religio, li estas pekulo.

Se li donas amon, li estas idiota. Se li ne zorgas pri iu ajn, li estas senkora. Se li mortas juna, li havis grandan estontecon. Se li maljuniĝas, li maltrafis sian vivon. Se li ŝparas monon, li estas avarulo. Se li elpezas ĝin, li estas stultulo. Se li akiras ĝin, li estas trompisto. Se li ne akiras ĝin, li ne estas kompetenta.

Do kial ĝeni sin?

La vivo estas nur unu damninda afero post la alia.

*Tradukita el la angla lingvo
de Sro Broadway.*

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

La gajnintoj de la du premioj jam ricevis aŭ baldaŭ ricevos specialan leteron pri sia sukceso. La nomoj aperos en la venonta numero de la revuo. Ni jam gratuas ĉiujn. La partoprenintoj ricevos la respondojn al la gramatikaj problemoj. Ili nur petu ilin. Nova konkurso baldaŭ komenciĝos. Ni rekomendas al ĉiuj sin pretigi per studado kaj kontaktoj kun gesamideanoj. Agrablajn feriojn al ĉiuj !

AMUZAJ PROBLEMOJ

Solve de la lasta problemo :

La trovotaj vortoj estis :

ŝafiro — kanapo — dilemo — cikado
nigelo — ŝoforo — rubeno — rafano
sukero — kaliko — humoro — miraĝo
kamelo — palato — fekulo — vagono
gagato — zefiro — rubuso — nababo

NOVAJ PROBLEMOJ (Sro Jarlier)


La komuna puto : Sur latero de triangula kampo troviĝas puto. Partigu la kampon en du ekvivalentajn tiamaniere, ke la linio de partigo pasos per la centro de aperturo de la puto, do ke la puto estos komuna.

Kompletigu, la jenajn multiplikojn

$\begin{array}{r} \text{— } 5 \text{ —} \\ \text{— } 4 \text{ — } 6 \\ \hline \text{— } 9 \text{ — } 8 \\ 6 \text{ — —} \\ \hline \text{— } 7 \text{ — — } 8 \end{array}$	$\begin{array}{r} 8 5 7 \\ \text{—} \text{—} 5 \\ \hline \text{—} \text{—} 1 \\ \text{—} \text{—} \text{—} 2 \text{ — —} \end{array}$
---	---

SUR LA HERBEJO

Johano paŝtas siajn kvin bovinojn kaj kvin bovidojn. La brutoj sin paŝtas aŭ saltetas tien kaj tien ĉi. Sed ĉiu bovido rekonas sian patrinon. Fakte ĉi tie nur du bovinoj estas la patrinoj de du el la bovidoj. Ili havas famili-aspekton. Pro tio vi facile rekonos ilin.



GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Via opinio pri la adverba participo estas tute prava : adverba participo povas esti uzata nur tiam, kiam ĝi rilatas al la subjekto de la frazo. Se ni deziras per participo esprimi la sencon : « kiu...-as », tiam ni devas uzi nepre la adjektivan formon de la participo ; la adverbajn formojn ni uzas nur anstataŭ : « kiam li (ŝi, ĝi, ktp)...-as » aŭ « ĉar...-as ». Anstataŭ : « la unuaj vojaĝantoj, kiuj traveturas Eŭropon », ni devas diri : « traveturantaj ». La vorto « traveturante » signifus : « kiam ili traveturas ».

(L.L. Zamenhof. Lingvaj respondoj.)



Senpetaliginte ĉiujn lekantojn, mi ankoraŭ ne scias ĉu mi amas vin.



Mendante la manĝon la unuan fojon en la franca lingvo, mi esperas ke mi ne eraris.



Mi vidis multajn interesajn aferojn vizitante Afrikon.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronci, Bana Cigel, PRIEDVIDZA.
Finnlando : S-ino Kerttu Väättänen, Mäntyläntie 4, LAPPEENRANTA 5 (4,5 mk.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1., 1-a, BARCELONO (55 pes.).
Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO.
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rode veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).
Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (5 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO Box 1231, BANGKOK (150 us. dol.).
Usono : S-ro D. W. Hoffman, 1444 Leslie Street HILLSIDE (N.J.).
Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (16 st.), aŭ respondkuponoj (12 respk), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo